

La lingva situacio en la hodiaŭa mondo, 3-a parto
Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI 546, 1974.03.27 & 30

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

La nuna lingva evoluo de la mondo estas tre interesa. Ĉiu atenta observanto tuj rimarkas, ke al la bilingvismo angla-franca, kiu karakterizis la internacian vivon ekde la kreo de Ligo de Nacioj en 1919 ĝis la eniro de la ĉina pekina delegacio en la organizaĵon de Unuiĝintaj Nacioj en 1971, substituiĝas trilingvismo, kie la franca lingvo forestas. Tiu trilingvismo estas bazita sur la internacia kaj paralela uzo de la tri etnaj lingvoj geografie plej disvastiĝintaj. Ili estas la angla, la araba kaj la hispan-portugala lingvoj.

A.- La aliaj ĉefaj etnaj lingvoj, kies geografia disvastiĝo restis limigita, devas kontentiĝi ludi duarangan rolon. Ĝuste inter tiujn lingvojn devas nun viciĝis la franca. Multaj francparolantoj tion malfacile akceptas. Tiuj duarangaj etnaj lingvoj estas laŭ la alfabeto ordo : la bantua, la bengala, la ĉina, la franca, la germana, la hindia, la japana, la persa kaj la rusa. Eble ni forgesis listigi kelkajn samrangajn lingvojn.

Cl.- La registaroj de la grandaj potencoj ĉiujare elspezas monsumegojn por la defendo kaj propagando de sia nacia lingvo. Malgraŭ tiuj financaj rimedoj la franca kaj angla lingvoj ne kapablis daŭre enradikiĝi en la aziaj kaj afrikaj ekskolonioj. La liberiĝintaj gentoj rapide revenis al sia denaska idiomo, kiun ili deziras altigi al la nivelo de literatura kaj kultura lingvo.

A.- Tiurilate ili inspiriĝis de la ĝeneralaj teknikoj kaj praktikaj aplikoj, kiujn proponis la soveta lingvistoj. Tiuj sciencistoj dum la 50 lastaj jaroj per lingva planado kapablis krei novajn lingvojn literaturajn el la amaso de neskribitaj idiomoj, kiuj karakterizis iujn regionojn de Sovetio.

Cl.- Ankaŭ la ĉinoj planadis la evoluon de sia lingvo kaj de ties skribo. Dum la franclingvanoj kaj angloparolantoj rigardas sian lingvon kiel netuŝeblan, aliaj gentoj konscie modernigas kaj unuecigas sian lingvon. Ĉiu memoras pri la modernigo de la hebrea lingvo. La modernigo de la araba lingvo estas malpli konata.

A.- La respondeculoj pri la klerigado de la analfabetaj popoloj konscias, ke nur helpe de instruo en la lingvo mem de la koncernatoj oni povos alveni al kontentigaj sukcesoj. Jam la kristanaj misiistoj tion komprenis. Pro tio ili ofte ludis avangardan rolon en Afriko kaj eĉ en Ameriko favore al la kreo de novaj literaturaj lingvoj. En hispanlingva Ameriko oni malkovras, ke apud la hispana daŭre vivas kaj eĉ disvolviĝas indiĝenaj lingvoj. Same en la eŭropaj landoj Francio, Hispanio kaj Britio daŭre vivas bretonaj, vaskaj kaj galaj lingvoj.

Cl.- La lingva evoluo favoras la plej disvastiĝintajn lingvojn, ludigante al ili la rolon de interlingvoj, tio estas de lingvoj, kiujn oni lernas por povi rilati kun aliaj lingvanoj. Sed samtempe la gentoj, kies lingvoj estis ĝis hodiaŭ subpremataj kaj persekutataj, konscias pri sia originaleco kaj komencas remodli sian parol-instrumenton, por igi ĝin kapabla plenumi ĉiujn funkciojn, kiujn oni povas atendi de moderna literatura lingvo.

A.- En tiun direkton ne nur laboras la revekiĝantaj popoloj. Ankaŭ aliaj homoj konscie aŭ nekonscie partoprenas la saman evoluoprocedon. Estas ĉiuj, kiuj provas doni vivon al novaj lingvoj. Tiuj idiomoj povas esti pli malpli kompletaj. Iliaj celoj ege varias. Ni ekzemple

menciu la komputeraĵajn kodojn **Algol**, **Fortran** kaj **Cobol** kaj la serĉadojn, kiuj efektiviĝas sub la gvidado de la **Fondaĵo Dalle Molle**, kies sidejo troviĝas en Svislando en la urbo Lugano. Sub la direkto de doktoro Treusch estas serĉata lingvo, kiun samtempe povus uzi homoj kaj komputeroj. Al tiu entrepreno kunlaboras lingvistaj grupoj en Padova, Milano, Pisa, Edinburgo kaj Germanio.

Cl.- Ni ankaŭ menciu la projektojn de universalaj lingvoj, kies sorto ege variis. **Solresol** kaj **Universal Glot** restis intencoj, sed **Volapük** profitis pri efemera sukceso. La **naturalisma** tendenco naskis idiomojn, kiuj restis sen influo sur la publikon. Ili nomiĝas **Idiom Neutral**, **Latino sine Flexione**, **Occidental** kaj **Interlingua**. Kontraŭe la planlingvo **Esperanto** tiris al si senĉese kreskantan nombron da praktikantoj. Kaj nun tiu lingvo esperanto havas propran parolantaron, literaturon kaj animon.

A.- Jam en 1923 Ligo de Nacioj registris tiun lingvan fenomenon. Ĝia Kultura Komisiono – la antaŭulo de Unesko – ekzamenis la disvolviĝon de esperanto kaj de ties konkurantoj. Sub la premo de la franca delegacio ĝi fine decidis, ke esperanto ne povas fariĝi laborlingvo de Ligo de Nacioj kaj de ties fakaj organizaĵoj. Tridek jarojn poste Unesko estis pli pozitiva. En 1954 la Ĝenerala Kunveno de Unesko, kiu disvolviĝis en Montevideo, akceptis rezolucion, kiu registris la progresojn de esperanto kaj atentigis pri la kultura rolo de tiu lingvo.

Cl.- Pro la progreso de tiu kultura rolo kaj la komplikiĝo de la lingvaj rilatoj en la mondo estas antaŭvideble, ke planlingvo kiel esperanto havas grandan estontecon antaŭ si, se ne naskiĝos pli taŭga konkuranto.

A.- Pri la futuro ni provos paroli la venontan semajnon.

Cl.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo!